

BONA ESPERO



Cirkulero 59

por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r.a.

prezidanto: Otto Nelken,

Hirschfeldstr. 6, D-59581 Warstein, ☎ 02902-57460

✉ u.nelken@t-online.de

Warstein, 2002-12-18

Karaj geamikoj kaj subtenantoj,

ankaŭ ĉifoje mi ŝatas prezenti al vi la situacion de Bona Espero dum la lasta ok monatoj el diferencaj perspektivoj. Kaj kiel lastfoje havu la plej grava de la partoprenigitaj personoj, la « ĉefino » Ursula la unuan vorton.

Ŝi skribis al ni antaŭ malmultaj tagoj :

« Nia jaro estis plena de ĝojoj kaj grandaj realigoj. Universala Kongreso ! Nova traktoreto ! Multaj vizitantoj el Eŭropo ! Multaj infanoj en la lernejo ! Nova placo kun scenejo [por artaj prezentoj antaŭ la eksa lernejo] kaj ĉefe – nenia granda problemo !

Ni matrikulis entute 44 infanojn, el kiuj pluraj forlasis nin meze de la jaro pro diversaj kialoj, kaj tuj venis novaj infanoj. Ĉiuj bone lernis kaj Igor sepjaraĝa eĉ eniros en februaro la 3-an klason. Nu, vivi en lernejo, jen la destino - lerni, lerni, lerni! ...

Cassius, ... ĵus finproduktis en la hejmo de Ulisses bonan unuhoran filmon pri Esperanto ĝenerale kaj la Universala Kongreso (UK) speciale. En la parlamenta TV estis sendita tiu programo kun brila sukceso. Nun, Ulisses volas ne plu redoni la knabon al ni, sed feliĉe Gloria, edzino de Moacir, lecionis kaj ankaŭ Giuseppe matematikon en la 3-a kaj 4-a klasoj.

Gevolontuloj estis Alexandre el Bariloche, Magali el Francio, Marit el Germanio, nun Franziska el Bonn(Germanio), Riccardo el Italio, Katrin kaj Ru el Nederlando kaj nun Arnau el Katalunio, karikaturisto, kiu pentras ĉiujn murojn per amuzaj komiksoj de la enloĝantoj de BE.

Plia eksa lernantino de BE, kiu brile kunlaboras, estas Adeli. Profesia kuiristino kun konoj de restoracioj en Brasilia - kiu volas gustumi, venu!

La nova traktoreto helpas nin pligrandigi niajn plantaĵojn de bananoj kaj fazeoloj, kaj ni estas tre kontentaj pri tiu granda donaco. Orlando fidele kaj kompetente kunlaboras. Por Ada estis la lernejo granda defio, kiun ŝi brile prizorgis kun bonegaj rezultoj. »

En la lasta rondletero mi skribis pri (de pluraj lernantoj verkitaj) ampleksaj monografioj. Tiu kun la plej bona noto taksita de Marit Bohr aperu baldaŭ en formo de libro, dukolumne germane kaj esperante, ĉe kio la neta enspezo el la vendo estos disponata por la infanvilaĝo.

Marit laboris tie somere kaj skribas pri siaj impresoj de tiam:

“Mi ankoraŭ ofte pensas pri mia bela kaj instrua tempo, kion mi pasigis en Bona Espero. Dum la du monatoj kiam mi estis tie, aŭdinte tiom multe pri la Esperanto-bieno kaj skribinte mian jarlaboron en la lernejo pri ĝi, mi finfine havis la eblecon mem konatiĝi kun Bona Espero.

donacokonto: konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede (BLZ/bankkodo 464 510 12)
kasistino: Dagmar Rahn, Hirschfeldstr. 3, D-59581 Warstein, ☎+49-(0)2902-700330, ☎+49-(0)2902-700328

Kiam mi finfine alvenis tie, komence estis ferioj en la lernejo kaj nenio estis kiel kutime: Post la fino de la Universala Kongreso en Fortaleza, la farmbiena lernejo estis vera renkontiĝejo por multaj junaj esperantistoj, kiuj travojaĝis la landon. Kaj tiel dum la unuaj semajnoj ni havis multajn gastojn (ekzemple Petra el Britio, Estelle el Francio kaj Elisabeta el Italio) kaj kompreneble por ĉiuj loĝantoj en la bieno multege da laboro.

Kun la vera ĉiutago mi povis konatiĝi nur ekde la tria semajno. Je la komenco de la lerneja tempo mi translokiĝis de la "Casa las flores" al la lernejo, en kiu loĝas Adarci kune kun 12 infanoj, kie mi ricevis mian propran malgrandan ĉambron. Ekde nun mi rajtis fari ĉiumatene la "verdan sukron" (suko el diversaj legomoj, citronoj, oranĝoj kaj aliaj fruktoj kaj kompreneble sukero) por la matenmanĝo, subteni Adarci [Ada] en la lernejo aŭ helpi Adeli en la kuirejo. Adeli nun loĝis kun sia filo Lucas ĉi-tie kaj kuiris por ĉiuj.


Krome mi nun scias kiom da laboro kaŝiĝas en unu taso da kafo, ĉar mi kune kun Petra bezonis duonan tagon por rikolti la kafograjnojn kaj finfine ni nur plenigis tri malgrandajn siteletojn.

Eksterordinara okazaĵo estis, kiam Maŭro venis dum semajnfino por instrui ludi gitaron al la infanoj kaj kanti kun ili kune, kompreneble nepagite.

Volonte mi rememoras la unuopajn infanojn kaj kiel vivĝojaj ili estis malgraŭ sia parte tiel malbona pasinteco. Kaj kiel respondece ili traktis la taskojn, kiujn ili devis plenumi.

Vespere post kiam ĉiu estis finmanĝinta kaj la kuireja laboro estis farita, Adeli kaj mi ĉiam havis iom da tempo por nia reciproka "lingvo-instruado". Adeli lernis Esperanton kaj mi la portugalan. Komence estis tre malfacile, ĉar ni ĉefe devis labori per bildoj por interkompreniĝi. Sed niaj rezultoj iĝis pli kaj pli bonaj, tiel ke mi eĉ ricevis leteron de ŝi en la lasta semajno en Esperanto.

Tre dezirinda laŭ mi estus, se ankaŭ aliaj familioj aŭ paroj troviĝus, kiuj estus pretaj, dediĉi ilian vivon al la bona lernejo, ĉar nur eblas akcepti pli da infanoj, se ankaŭ estas pli da plenkreskuloj, kiuj vivas tie kaj prizorgas la malgrandajn.



Marit kun kelkaj knabinoj

Fine mi povas diri, ke mia restado en Bona Espero ĉiukaze estis valora kaj tre multaj aferoj, pri kiu mi jam antaŭe aŭdis, montriĝis pli pozitivaj ol mi atendis.

La du monatoj por mi estis tre instruaj kaj mi esence ŝanĝis mian opinion pri kelkaj aferoj ĉi-tie en Germanio. Tiel mi nun, kiam kristnasko alproksimiĝas, demandas min mem, ĉu tiu sensenca donacado de aferoj, kiujn oni plej ofte ne bezonas, entute necesas, se oni en Brazilo per la sama mono povus ebligi la nutradon, bonan lernejan instruon kaj antaŭ ĉio protekton kaj prizorgadon por unu infano dum tuta monato."

Unuafoje en la historio de Bona Espero kelkaj elektitaj geknaboj kun siaj intimaj plenkreskulaj geakompanantoj povis partopreni al UK. Tie ili – por ĉiu ekkoneblaj pro sia speciala eksteraĵo kiel bonesperanoj – povis varbi sukcesege

por sia vilaĝo. Antaŭ ĉio pro ilia ĉirkaŭe jubilata muzika sceno kune kun Georgo Handzlik dum la granda internacia vespero antaŭ ĉ. mil gerigardantoj. Al la granda sukceso la gitaristo Maŭro, Cassius kaj antaŭ ĉio Ada havas gravan parton.



Bonesperanoj en Fortalezo

Kaj nun unu de la malgrandaj artistoj, la antaŭe menciita Igor (filo de Ada) raportu pri sia aventuro dum la unusemajna kongreso:

»Por mi la Universala Kongreso en Fortaleza, ĉe la maro, estis granda surprizo kun tiom da homoj, kaj ĉiuj parolis kun mi! Kaj mi komprenis ilin. Mi havis rubandon de BONA ESPERO sur la kapo kaj ĉiuj volis ŝteli ĝin de mi. Sed mi ne lasis. Loĝi en vera hotelo estis granda novaĵo por mi kaj Emanuelle, Tayná, Rafael, Adão, Vanessa, Orlando kaj la aliaj el Bona Espero. Ni manĝis multajn novaĵojn, kiujn en Goiás ni ne konas.

En la infan-kongreseto mi estis tre gaja, ĉar mi ludis kun infanoj, kiujn mi neniam vidis antaŭe. Sed ili estis geamikoj kun mi. La plenkreskuloj multe kaj longe parolis kaj parolis, sed ne interesis min kiel la ludoj.

La maro estis tre plena de salo, kial ne de sukero? Vivi en granda urbo kaj devi uzu aŭtobuson plenplena de homoj - kia tragedio! Mi preferas loĝi, kaj ankaŭ la aliaj infanoj de BE, en la bieno.

La aviadilo timigis ĉefe Rafael - li tremis kaj iom ploretis kiam li eniris la grandan birdon, sed poste li ŝatis manĝi la interesajn malgrandajn manĝaĵojn. Venontan jaron ni ĉiuj volas iri al la kongreso en Belo Horizonte. Sed jarfine venos multaj esperantistoj al Bona Espero por festi la novan jaron. Kaj mi preparos kun la aliaj infanoj grandan fajron sur la futbalkampo! »

La elekto de la volontulo Cassius kiel prezidanto de la Brazila Esperanto-Junularo estas konforma al la sukcesoj de la bonesperanoj. Tri geinstruistoj instruis ĉi-somere 38 infanojn: Ada, la nigra Ursula (kiel Orlando eksa bonesperano) kaj Cassius.

Al la 6 – 16 jarojn aĝaj apartenas pli kaj pli fiuzitaj knabinoj, malbontraktitaj knaboj kaj speciale handikapitoj. Tial oni bezonas pro la pli oftigantaj kaj pli malfacilaj laboroj ĉiam denove gehelpantojn el la tuta mondo, kiuj ŝatas kunlabori por senkosta restejo kaj nutrado en belega ĉirkaŭo (Alto Paraíso = alta paradizo) kune kun amindaj homoj kelkan tempon. Gxis nun antingis nin nur entuziasmaj raportoj el propra sperto de tiaj "gastlaborantoj".

Kaj kio krome nova, interesa rilate al nia bieno? Post kiam la urĝege bezonita, de ni financiita, traktoreto alvenis ekzakte je la 70 a naskiĝtago de Ursula, oni esperas koncerne aliajn necesajn projektojn ankaŭ pri la subteno fare de la germana ambasado, el kiu ataceino intertempe vizitis Bona Espero kune kun vojaĝogrupo kadre de la UK.

La dua tombolo kadre de la ĉijara PSI (Printempa Semajno Internacia) favore de niaj infanoj same sukcesis kiel nun jam tria ĉi-rilata aŭkcio ĉe la Zamenhof-festo en Herzberg.

Finfine mi ŝatas memori pri mia antaŭa peto rilate al via aktiva kunlaboro ĉe niaj rondletoj. Eble vi ankaŭ rigardu la intereton! Tie vi nome povas trovi nian novan, helpe de Daniel König verkitan hejmpaĝon ĉe www.bona-espero.de, kiu bedaŭrinde ankoraŭ ne tute pretas.



Ada kun Tayná, Vanessa, Emanuelle, Igor

Karaj geamikoj, ankaŭ hodiaŭ mi ŝatas ne forgesi ĉiujn de vi "malnovajn" kaj novajn, kiujn mi tre kore salutas en nia granda "familio", danki el tuta koro pro ĉio bona, kiun vi faris por nia infanvilaĝo. Bonvolu, konservu al ĝi vian fidelecon ankaŭ plue!

*Al vi ĉiuj mi deziras nome de
la estraro kaj de la infanoj
kaj la prizorgantoj
el Bona Espero
belan kristnaskan feston kaj
sukcesan same kiel
- ĉi-foje speciale -
pacan Novan Jaron!*

Ada Nick